# TEJO-aktuale: numero 107, 2003-04-07

T E J O - A K T U A L E                    N-ro 107 (7 Aprilo 2003)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>;

---

1. PROPONO DE TEJO PRI MODERNIGO DE LA CENTRA OFICEJO
2. JUNULARA ESPERANTO-AGADO EN EŬROPO: RAPORTO EN LA RETO
3. FINNAJ LERNEJOJ SERĈAS KONTAKTOJN POR "EŬROSCOLA"
4. ESPERANTA TENDARO EN RUSIO

---

## 1. PROPONO DE TEJO PRI MODERNIGO DE LA CENTRA OFICEJO

Ĉe <http://www.tejo.org/dok/proponaro_pri_modernigo.html>; legeblas propono de TEJO pri oficeja modernigo, investa politiko de Universala Esperanto-Asocio kaj ekhavo de TEJO-oficisto. Se vi konsentas kun ĝi, vi povas sendi subtenleteron al <marko@tejo.org>, adresante al la estraro kaj ĝenerala direktoro de UEA.

---

## 2. JUNULARA ESPERANTO-AGADO EN EŬROPO: RAPORTO EN LA RETO

La protokolo de la lasta OKEJ/MEJK (konferenco de okcident- kaj mezeŭropaj Esperanto-junularoj) troveblas ĉe <http://www.tejo.org/la/mejk_okej.jsp>;.

---

## 3. FINNAJ LERNEJOJ SERĈAS KONTAKTOJN POR "EŬROSCOLA"

Lernejanoj en Finnlando serĉas aliajn grupojn en Eŭropo por koresponde konatiĝi kaj - post unu jaro - kune viziti Strasburgon kadre de la projekto Eŭroscola. Skribu al Carola Antskog <cantskog@kolumbus.fi>.

---

## 4. ESPERANTA TENDARO EN RUSIO

Centra Rusio, de la 4a ĝis la 12a de aŭgusto 2003: esperanta tendaro "OkSEJT-43". Eksterlandanoj pagos nur 10 EŬR por loĝado, lignofajra manĝado kaj programo. Se vi ne havas propran tendon, mendu lokon en tendoj de organizantoj. Post OkSEJT eblas resti por la tuj sekvaj Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET). Bonega ebleco vidi Rusion kaj ekhavi novajn amikojn. Informoj:
<http://www.tejo.org/rejm/oksejt>;,
<rejm@tejo.org>.

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikaĵoj/aktuale/koncepto.html>;.
La arĥivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>;.
Por aboni sendu mesaĝon al <majordomo@esperanto.org> kun la enhavo:
subscribe tejo-aktuale
Informojn kaj komentojn sendu al <tejo-aktuale-red@esperanto.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Oleg Izjumenko, Jevgenij Gaus, Giuseppe Castelli.
Tiun ĉi numeron redaktis Giuseppe Castelli.

Pri TEJO-AKTUALE ĉe Abonu.com zorgas Slavik Ivanov.